

revuo

esperanto

marto 1968

61-a jaro

n-ro 748 (3)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



PLIBONIGI LA INSTRUMENTODOJN
konsiloj por la kursestroj sur p. 36

ESPERANTO

revuo internacia

havo

- 33 TEJO en la trideka jaro (Osibov)
- 34 Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo (CED - daŭrigo)
- 36 Modernaj instrumentoj (Petrin)
- 37 Leteroj
Lastmomente: Norda Prismo
- 38 Recenzoj
Ricevitaj eldonaĵoj
Citaĵo
- 39 Mallonge
Nekrologoj Wulczek, Zuber, Campbell
- 40 La Juna Vivo
- 41 Esperanto en radio
Internaciaj Konkursoj 1968
53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
- 42 Oficiala informilo n-ro 400:
Laŭlanda membro-statistiko 1967
- 43 Konsideroj pri la membro-statistiko
- 44 Anoncetoj

vrila bildo

S-ino Maria Vitalyos utiligas la revuon "Esperanto" kiel instrumaterialon en kurso por hungarlingvanoj en Tîrgu Secuiesc, Rumanujo. Sur p. 36 ŝia samlandano Jozefo Petrin proponas kelkajn konsilojn al kursgvidantoj. Por la hungara malplimulto en Rumanujo estas disponeblaj la lernolibroj de Baghy kaj Szerdahelyi, eldonitaj en Hungarujo. Por la rumanoj mem, tamen, ekzistas nek lernolibroj, nek gazeto, nek organizaĵo (Vidu p. 34-35).

TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA, KIUN VI RICEVOS

ne paginte ankoraŭ vian kotizon por 1968! Zorgu, ke neniu numero mankos al vi. Se vi ankoraŭ ne kotizis por 1968, PAGU TUJ!

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
revuo 1968

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1968): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo — la junulara sekcio de UEA — plenumos en 1968 la aĝon de tridek jaroj.

Fondita en 1938, ĝi trapasis ĉiujn periodojn, kiuj karakterizas la vivon de la junulo, de la homo. Ĝis 1949 ĝi estis ĉefe organizaĵo de junaj lernejoj, gvidata, kiel vera infano, de plenaĝuloj — plej ofte instruistoj. Inter 1949 kaj 1957, post kriza milita tempo, ĝia interna organizo plifortiĝis, sed la aktivecoj restis preskaŭ nur eldonado de "La Juna Vivo" kaj la organizado de la internaciaj junularaj kunvenoj. En 1957 UEA akceptis ĝin kiel sian junularan sekcion. De tiam la membraro ek-kreskis, novaj homoj transprenis la funkciojn, kaj la aktivecoj plimultiĝis. Tamen ĝis 1963 la Organizo vivtenis sin de la poŝmono ricevita de la gepatra Asocio. La financa aranĝo kun UEA en tiu jaro ebligis al TEJO gajni per sia laboro pli da monrimedoj, kio donis la financon bazon por la disfloro de la agado dum la lastaj jaroj.

TEJO celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo pere de disvastigo de Esperanto inter la junularo, ĝia enkonduko en la lernejojn, ĝia praktika utiligo je la servo de la junularo kaj la okazigo de internaciaj junularaj kongresoj. Ĝi komprenas, ke ĝi ekzistas en la mondo de intensaj internaciaj kontaktoj, de kreskanta intereso ĉe la junularo por aliaj landoj, por internaciaj kunlaboro kaj amikeco. Tial ĝi volas per sia agado ebligi kaj plifaciligi kontentigon de tiuj intereso, tiujn kontaktojn, kunlaboron kaj amikecon ne nur al siaj membroj, sed ankaŭ al aliaj gejunuloj. Ĝi starigis firmajn kontaktojn kun pluraj internaciaj junularaj organizaĵoj, kiuj havas similajn celojn. Pluraj rimarkindaj atingoj jam kronis tian ĝian agadon, sed ĝi ne volas kontentigi per ili. Kompreneble, do, en siaj planoj kaj strebadoj ĝi renkontas ankaŭ plurajn problemojn.

Kiel alligi la lerneajn kursanojn?

Se oni komparas la membronombron de TEJO kaj la nombron de la geknaboj, kiuj lernas la Internacian Lingvon en la lernejoj, oni konstato, ke nura aligo de unujara lerneja lernantaro duobligus la membraron de TEJO. Nun restas grava problemoj, kiun TEJO devas solvi, kiel organizi tiujn lernantojn en la lernejoj kaj helpe de la lokaj grupoj kaj la landaj sekcioj ligi ilin al TEJO. Tio alportus novajn kunlaborantojn, novajn aktivulojn, plilarĝigon de la financa bazo kaj pli grandan moralan prestiĝon. Nun la nombro de la aktivuloj estas tre malgranda kompare kun la taskoj, planoj kaj la deziroj de la Organizo. Utilaj ideoj kaj favoraj okazoj abundas, sed tre ofte ni kun bedaŭro vidas ilin pretergliti neeluzitaj, ne havante homon,

kiu dediĉos sin al ili. Per seminarioj por gvidantoj, studado de varbmetodoj, k.s., TEJO klopodas solvi tiun ĉi problemon.

La aĝo forpelas spertulojn

Tiun homan, aktivulan problemon ankoraŭ pliakrigas la objektivaj faktoroj: la naturo de la junulara organizaĵo kaj manko de profesia aparato. Tuj kiam gejunuloj sufiĉe spertiĝas kaj kapabliĝas, kiam ili pleje povus utili al sia organizaĵo, la aĝo forpelas ilin, kaj oni devas konstante renovigi la proceson. Eĉ tiuj plej aktivaj, kiuj plej longe restas en la Organizo, ne sukcesas eluzi siajn tutajn talenton kaj energion por organizi la laboron, por pliefikigi kaj modernigi la metodojn, por eltrovi novajn vojojn en novaj cirkonstancoj, ĉar ili devas plimulton de la tempo foruzi por teknikaj, rutinaj laboroj.

La mono, pri kiu disponas TEJO, apenaŭ sufiĉas por kovri la kostojn de ĝia nura ekzisto. Tial la Organizo nek povas plani, nek povas entrepreni iun ajn aktivecon mem. Ĝi nur povas doni la ideon kaj helpi en la organizado, sed ĝi devas ĉiam trovi iun alian, kiu financos la tutan entreprenon. Tio estas tre grava problemoj en la nuna disflorinta aktiveco de la Organizo, kiu postulas rapidan reagon kaj konstantan entreprenadon de novaj aktivecoj kaj novan monon.

Konfliktoj inter la generacioj

Fine la plej dolorigan problemon TEJO kaj precipe ĝiaj landaj sekcioj renkontas tie, kie plej malmulte ili atendas tion: ĉe esperantistoj — plenaĝaj. Neniu el la landaj sekcioj ĝis nun insistis pri sia absoluta sendependeco de landa asocio, ili nur montris, ke la junaj homoj vivas en speciala medio, kun apartaj kutimoj, impetemo, ardo, por kiuj ne taŭgas la metodoj kaj organizmaniero, kiujn aplikas la plenaĝuloj. Tio ofte provokas malbenon de plenaĝuloj kaj poste konstantan superfluan kaj malutilan kverelon. Freŝan ekzemplon ni havas el lando, kie la plenaĝuloj eĉ ne volis doni informojn al la gejunuloj pri iliaj samaĝuloj, kiujn ili volis kontakti por pritrakti la fondon de landa junulara sekcio. Kaj tio por almenaŭ unu jaro bremsis la fondiĝon.

La problemoj, kiujn TEJO renkontas, estas la problemoj, kiuj venas el la laboro kaj strebado plilarĝigi tiun laboron kaj ankoraŭ pli multe kaj pli racie eluzi la ĉiam pli favorajn kondiĉojn por la Internacia Lingvo en la internacia socio. Tiuj problemoj meritas la atenton kaj la helpon en ilia solvado de la tuta movado, ĉar la sukcesoj de TEJO estas la sukcesoj de la Movado.

Ivo Osibov
Prezidanto de TEJO

espero
marto 1

En la unua parto de tiu ĉi studo ("Esperanto", februaro, p. 14-15) ni sekvis la historion de la persekutoj, precipe en Soveta Unio, Hispanujo, Portugalujo kaj Germanujo, ĝis la tempo de la kontraŭ-Esperanta dekreto de 1949 en la tiama soveta zono de Germanujo.

Sanĝis nenion la fondo, en oktobro 1949, de la Germana Demokratia Respubliko kaj la transdono al ĝi en 1950 de la rajto kontroli organizaĵojn, kiun ĝis tiam konservis la soveta administracio. La nova registaro skribis en letero de 4 nov 1949 al Unuiĝo de Homoj Persekutitaj de la Nacisocialista Reĝimo: "La esperantomovado kiel grupo por artefarita lingvo estas nuligita laŭ la dekreto de 12.1.49 kaj la aldona dekreto de 19.7.49. Estas fakto, ke kontraŭuloj de nia demokratio provas ĝeni niajn laborojn per helpo de esperantogrupoj. Per gazetoj aperantaj eksterlande kaj per tiel nomata internacia societo kun sidejo en München³⁾ oni provas sub preteksto de kultura neceso gajni anojn, per kies helpo oni volas malbonfamigi nian demokratian ordon." Denove la pretekstoj ignoras la fakton, ke, eĉ se fakte Esperanto estis uzata por tiu celo, ankaŭ la naciaj lingvoj devus esti malpermesitaj laŭ la sama rezonado.

Eksilento

Germanujo ne restis longe tia izolita kazo. Iom post iom eksilentis Esperantaj gazetoj, radio-elsendoj, organizaĵoj, verkistoj kaj simplaj korespondantoj preskaŭ tra tuta orienta Eŭropo. La silento daŭris ĝenerale ĉ. kvin-ses jarojn; en iuj landoj ĝi daŭras ankoraŭ nun, 20 jarojn poste. Same kiel la fruaj malpermesoj en la cara Rusujo, la nova subpremo estis des pli dolora, ĉar ĝi trafis ĝuste tiujn landojn, kie plej enradikiĝis la Internacia Lingvo. Tiun baton respegulas ankaŭ la nombroj de individuaj membroj de UEA, kiuj falis je ĉ. 1000 en la periodo 1948-1955.

Pollando, naskiĝlando de Esperanto, mem ne povis esti escepto. "Pola Esperantisto" ĉesis aperi en 1948 kaj restariĝis nur en 1957; tiam ĝi mem klarigis, ke "la kaŭzo kuŝis en la tiamaj politikaj cirkonstancoj". Tamen: "La pola esperantistaro neniam rezignis pri sia organo. En plej malfavora tempo ni eldonis ... informilon ... hektografite en tre modesta vesto." Simile disvolviĝis la eventoj en Bulgarujo.

Pli detale dokumentebla estas la historio hungara. Politika premo estis sentebla jam en 1949: laŭ "Esperanto" — "La 6-an de Marto la membroj de Hungarlanda Esp. Societo ... kunvenis en Budapeŝto. La nova ĉef-sekretario,

S. Papp, deklaris, ke la societo povas labori nur se ĝia programo akordiĝas kun tiu de la registaro." Fine de tiu jaro ĉesis aperi la granda "Literatura Mondo", kaj komenciĝis la periodo, kiun hungaroj poste nomis majuskle "La Granda Silento". Por la ekstera mondo tiun silenton profundigis la fakto, ke ĝi enfermis la voĉojn ankaŭ de la plej grandaj Esperanto-verkistoj. Eliris el ĝi nur kelkaj el la plej pesimismaj poemoj de Julio Baghy.

En 1950 jam neniu Esperanta gazeto plu aperis en Hungarujo. Komitatkunsido de Hungarlanda Esperanto-Societo la 6-an de aprilo voĉdonis, ke "la Esperanto-Societo provizore interrompu sian agadon".

La teoria bazo

La tuta subpremado de Esperanto ricevis fine klare esprimitan politikan bazon en julio-aŭgusto de 1950, kiam "Pravda" kaj "Bolŝevik" publikigis respondojn de Stalin, i.a. tiun al k-do A. Holopov, en kiu Stalin detale eksplikis sian teorion, ke nur post la venko de socialismo en monda skalo povos ekzisti internacia lingvo, kreigonta, laŭ li, el intermiksiĝo de la naciaj lingvoj.

La ĉeĥoslovaka organo "Esperantista" jam en la unua parto de tiu jaro publikigis avertojn de A. Malík, ke ĉiu ĉeĥoslovaka esperantisto devas labori por la ŝtataj celoj, se li ne volas detrui la movadon, kaj de L. Gregor (el la ministerio de informoj), ke "... la esperantistoj povas aliĝi ekskluzive al socialismo kaj disponigi siajn rimedojn por servo al la laborista klaso kaj por batalo kontraŭ kapitalismo ..."

Nun, post la eldiroj de Stalin, la situacio de la Esperanto-Asocio fariĝis apenaŭ tenebla. Kiel lasta rimedo, E.A.Ĉ.S.R. ekŝiĝis el UEA la 31-an de decembro 1950: "por helpi plifortigon de la esperantista movado en nia ŝtato kaj en la ceteraj landoj de popola demokratio", kiel ĝi klarigis en sia ekŝiĝa letero. Pri tio skribis "Esperantisto Slovaka": "Antaŭ ĉio la movado en ĈSR liberiĝos el sub la suspekto, ke en nia ekzistanta popoldemokrata sistemo ĝi volas resti movado kosmopolita." Sed jam nenio helpis. Letero de d-ro Kamarýt al UEA la 20-an de oktobro 1952 informis, ke "Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko likvidiĝis libervole laŭ konsilo de la Ministerio de Interno en Praha, la 6-an de septembro 1952, per decido de la Asocia Komitato". (En la originalo la vorto "libervole" estas aldonita super la linio, kvazaŭ postpense.)

Tiun jaron reagis publike kontraŭ la stalinaj teorioj la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT per unika "Nefermita letero. Al J. V. Stalin, Moskvo", subskribita "Londono-Parizo, Majo 1952". En sia esenco la letero atribuis la kontraŭ-Esperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo. Ĝi atentigis,

³⁾ Sendube aludo al Germana Esperanto-Asocio, kies estraro tiutempe laboris en Munkeno.

ke "Eĉ la nuran eblecon de internacia lingvo en la nuntempo oni atakas kiel esprimon de 'kosmopolitismo, ideologio reakcia de la imperialista burĝaro' (Voprosy filozofiji, N-ro 2/1949). Oni ne hezitas aparte deklari, ke la rusa lingvo 'ne estas nur la lingvo de U.S.S.R., sed ankaŭ la Internacia Lingvo en la popolaj demokratioj' (Prof. Jakovljeviĉ en 'Vestnik Akademiji Nauk SSSR', N-ro 2/1950)."

La postan jaron mortis du grandaj malamikoj de la Internacia Lingvo: Stalin mem, kaj la ĉeĥa Gottwald. (Ironie, "El Popola Ĉinio" de aprilo 1953 funebris pri Stalin ĝuste en tiu lingvo anatemita.) Sed ilia politiko daŭris ankoraŭ kelkajn jarojn. Responde al klopodoj de Max Hirsch en Germanujo, la Prokuroro de Germana Demokratia Respubliko, Reizmann, klarigis la 17-an de marto 1955, ke "artefaritaj lingvoj ne prezentas naciajn lingvojn kaj tial havas, laŭ la instruo de la neforgesebla J. V. Stalin pri demandoj de marksismo en la lingvistiko, nenian sciencon aŭ kulturan bazon, ĉar ili posedas nek leksikan fundamenton nek propran gramatikon." Efektive, nur en 1961, do ok jarojn post la morto de Stalin, la tiea registaro nuligis la dekreton de 1949; la fondo de organizaĵo kaj Esperanto-gazeto devis atendi ankoraŭ ĝis 1965.

Malrapida printempo

La jaroj 1955-57 alportis tra orienta Eŭropo ian politikan printempon, en kiu diverslande (re)fondiĝis organizaĵoj, gazetoj kaj kursoj, aperis kelkaj lernolibroj kaj povis okazi eĉ internacia konferenco. Tiu lasta, kiun partoprenis reprezentantoj bulgaraj, ĉeĥaj, jugoslavaj, hungaraj kaj rumanaj, "unanime decidis apogi la laboron de Universala Esperanto-Asocio kaj rekomendas al la partoprenantaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj ankoraŭ ne membras en UEA, senprokrastan aliĝon." Tiel en 1956. La ĉeĥoslovakoj, tamen, povis fondi asocion (Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato) nur en oktobro 1957, kaj ankoraŭ ĝis hodiaŭ ne sukcesis aliĝi al UEA. La prezidanton de la nova Komitato enoficigis la Ministerio de Kulturo, sen konsulto kun ĝiaj membroj. En letero tiutempa iu plendis: "Ni estas jam la lastaj en Eŭropo. Hispanujo kaj Salazara Portugalujo nin jam antaŭiris."

La lastaj? Ne. Alia lando partopreninta en la konferenco de 1956, Rumanujo, havas ĝis hodiaŭ nek asocion, nek iun ajn gazeton, de kiam malaperis la postmilita "RES-Bulteno". Iniciata Komitato fondita en 1956 havis nur paperan vivon. Esperantaj kongresoj aŭ libroeldonoj jam ne okazis de antaŭ la milito. Ke neniel temas pri manko de merkato, klare montras la amasa partopreno de rumanoj en la Universalaj Kongresoj en Sofio kaj Budapeŝto. Forte bremsis la agadon ankaŭ la lingvisto Graur (vidu "Esperanto" 1964, majo, p. 82-3).

Jam en 1956 aperis provoj por restarigi iam prosperan movadon en Soveta Unio. Aperis la unua numero de grandformata presita gazeto

"Armena Esperantisto", sed la duan numeron oni ankoraŭ atendas pacience. Ekde 1957 aperis kelkaj modestaj lernolibroj, kiuj tre rapide elĉerpiĝis, sed nenio proporcia al la publika interesiĝo. En 1963 salutis la Universalan Kongreson en Sofio oficiala soveta delegacio — la unuan fojon post la milito —, sed la partopreno en tiu kaj postaj internaciaj kongresoj restis nombre tre limigita. Samjare subite severiĝis la kontrolado kaj cenzurado de Esperantaj eldonaĵoj el eksterlando: la revuo "Esperanto" povis atingi adresojn en Soveta Unio nur sub registrita banderolo kaj eĉ tiam ofte revenis aŭ malaperis; hodiaŭ la situacio apenaŭ pliboniĝis. (Tiu fenomeno koincidis, eble ne hazarde, kun la pli intensa ekuzo de la lingvo por politikaj informoj el Pekino.)

En 1965 stariĝis Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, kaj samjare Armena Esperanto-Komisiono, kvankam tiu lasta de tiam ne montris vivosignon. Sekvis en 1966 Uzbeka Esperanto-Komisiono. La Komisiono en Moskvo eldonas iom regule diversajn ofsetaĵojn, sed ŝajne nur por eksterlanda merkato: malfacile ili estas akireblaj en aliaj partoj de la lando. Asocio ankoraŭ ne ekzistas.

Per tiuj konstatoj ni atingas la hodiaŭon kaj povas iom superrigardi la situacion diverslande. La apero de Esperanta libro en Portugalujo en 1959 restis hirundo unuopa. Hodiaŭ la portugala cenzuro konfiskas ĉion, kio eĉ nur aspektas esperantlingva. Movado tie praktike ne ekzistas. La samo validas por dependaj teritorioj kiel Mozambiko, kie la Esperanto-Asocio venis sub suspekton. Same severa, almenaŭ kontraŭ okcidentaj eldonaĵoj, estas la orient-germana cenzuro. Albanujo daŭrigis ĝis hodiaŭ sian stalinecan subpremon de Esperanto, malgraŭ la aktiva uzado de la lingvo fare de ĝia politika aliancano Ĉinujo. Anomalia estis ankaŭ la sinteno de la reĝimo Sukarno en Indonezio, kiu ĉesigis la publikan vivon de Indonezia Esperanto-Asocio kiel ankaŭ de multaj aliaj internaciemaj organizaĵoj, malgraŭ la politika proksimiĝo al Pekino. La ŝanĝo de reĝimo ŝajne ne plibonigis la pozicion de Esperanto. En Tajvano kaj Tajlando, aliflanke, ĝuste pro la Esperantaj eldonaĵoj de Pekino k.a., la lingvo mem estas suspektata ĉe la aŭtoritatoj.

☆

En 1968, Jaro de Homaj Rajtoj, UEA — nome ĉiuj ĝiaj organoj kaj membroj — havas du distingeblajn rimedojn por reestabli la rajton uzi Esperanton tie, kie ĝi suferis persekutojn. Unue ni povas per nia informado fari ĉion eblan por forigi miskomprenojn pri la Internacia Lingvo, precipe tiun, ke la lingvo en si mem estas politike tendenca. Due ni povas kaj devas publike kaj internacie akuzi tiujn registarojn kaj aliajn instancojn, kiuj malhelpas aŭ persekutas ankoraŭ hodiaŭ la uzon de Esperanto por kiu ajn celo. Ne estas certe, ke tiu agado baldaŭ donos fruktojn; sed estas tute certe, ke silenta pasiveco ne forigos la malbonojn.

V.S.

espera
marto 1



Jozefo Petrin

MODERNAJ INSTRUMENTODOJ

aplikeblaj al la strukturo de Esperanto

La homaro travivas novan epokon, en kiu la ĉiufankaj internaciaj rilatoj impete disvolviĝas kaj de tago al tago la Lingvo Internacia iĝas pli necesa.

En tiaj novaj kondiĉoj estas nepre necese elimini el niaj ĝisnunaj instrumentodoj ĉion, kio povus malfruigi, kaj adopti ĉion, kio povus plibonigi kaj plirapidigi la proceson de perfekta alproprigo de Esperanto fare de novaj lernantoj.

Unuavice ni devas elimini la kredon, ke oni povas "improvizi" Esperantajn kursojn. Kurso devas esti gvidata kompetente laŭ ĝenerala plano, en kiu la ellernota materialo estu aranĝata laŭgrade por tuta serio da lecionoj.

Antaŭ ĉiu leciono oni devas prepari la laŭnecesan didaktikan materialon (objektoj, bildoj, desegnaĵoj, diapozitivaj, magnetobendoj, gramofondiskoj, interŝanĝebla materialo kun surskribitaj radikvortoj kaj vorteroj) kaj antaŭvidi detalan, konkretan planon adaptitan al la komprenpovo kaj kulturnivelo de la lernantoj.

Interplekti plurajn metodojn

La instruado devas esti plurflanka kaj -fronta (t.e. labori samtempe kun ĉiuj lernantoj, per kontinua, aktiva ripetado kaj kontrolado de la ellernita materialo) — uzante la konversacian metodon, interplektita kun la gramatika metodo (t.e. integri la gramatikajn regulojn kaj la ĉefajn principojn de la lingvo en la konversacion), hejmajn ekzercojn (kun respondoj al diversaj demandoj, frazformado kun la ellernita materialo, tradukoj el kaj al la gepatra lingvo) kaj aliajn eblecojn.

Laŭ la modernaj psiko-pedagogiaj metodoj, ankaŭ niaj instruistoj devas uzi la induktan kaj intuician metodojn, sed precipe la novan sistemon de strukturaj ekzercoj.

Konforme al la indukta metodo, la lernantoj estas alkondukataj, kun la helpo de kursgvidanto, trovi la gramatikan regulon el pluraj ekzemploj.

Laŭ la intuicia metodo, la lernantoj ellernas la nomojn de objektoj, de ecoj, agoj kaj statoj k.t.p. sur bazo de didaktika materialo. Tiamaniere oni evitas la lernigon de novaj vortoj per tradukoj el la gepatra lingvo aŭ per pli aŭ malpli amuzaj difinoj de nocinomantaj vortoj.

La sistemo de strukturaj ekzercoj

Laŭ la moderna sistemo de strukturaj ekzercoj, oni uzas dum la konversacio kun la lernantoj kaj inter la lernantoj propoziciojn kaj frazojn, en diversaj jesigaj kaj neigaj, demandaj kaj respondaj formoj, en kiuj oni alterne ŝanĝas unue la subjekton (per alia substantivo aŭ egalvalora vorto), poste la predikaton (per alia verbo aŭ disvolvita formo en diversaj tempoj kaj modoj) kaj fine la komplementojn (per

diversaj aliaj formoj de komplemento).

Tiamaniere ni alkitimigas la lernantojn al vortara, morfologia kaj sintaksa "aŭtomatisimoj" (pri kiuj pritraktis ankaŭ Andreo Pettyn en la revuo "Esperanto" n-ro 724/1966).

Sed ĉi tiuj metodoj, uzataj ankaŭ por la instruado de aliaj fremdaj lingvoj, ne sufiĉas por plibonigi nian instrumentodon kaj pliproksimigi nian celon, nome, ke la novaj lernantoj flue kaj korekte uzu skribe kaj buŝe la Internacian Lingvon.

Estas rimarkeble, ke la novaj lernantoj de Esperanto pli rapide sukcesas legi kaj kompreni, ol paroli la lingvon. Tio estas klarigebla pro la facileco kaj simpleco de nia lingvo, sed "paroli" jam signifas esprimi la penson per lingva materialo.

En la gepatra lingvo, por esprimi nian penson, ni ĉiumomente devas aŭtomate mense kompari, distingi, identigi, analizi la vortsenojn, kaj poste racie kaj logike kunligi la elementojn, el kiuj konsistas la vortoj kaj la propozicioj. Tiuj ĉi mensaj operacioj, kiujn ni aŭtomate faras dum la elparolado en gepatra lingvo, konsistigas la plej grandajn malfacilaĵojn je ellernado de "fremdaj lingvoj", sed estas ege simpligataj kaj faciligataj de la interna strukturo de Esperanto.

La bazo de la lingva sistemo de Esperanto kuŝas en la dismembrigo de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel, ke la tuta lingvo — anstataŭ el vortoj en diversaj gramatikaj formoj — konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. La diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj, kiuj sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu presita en la vortaro.

La struktura sistemo de nia lingvo permesas liberan vortordon en la frazo kaj la eblecon esprimi ĉiun ideon ĉu en sinteza formo (t.e. per unu vorto simpla aŭ kunmetita), ĉu en analiza aŭ disvolvita formo (t.e. per pluraj apartaj vortoj aŭ per tuta propozicio).

Komprenigi la internan strukturon

Sur bazo de ĉi tiuj trajtoj de Esperanto ni povas apliki pli produktive la strukturajn ekzercojn.

Per tiaj ekzercoj ni povas montri al lernantoj la eblecon, kiun ni havas, aliklasigi la vortradikojn (per ŝanĝo aŭ per aldono de gramatikaj finiĝoj), formi vortkunmetaĵojn, libere konstrui la frazojn, transformi la sintezajn (iom abstraktajn) formojn en iliajn respondajn analizajn (pli konkretajn) formojn. Samtempe ni povas klarigi, kiamaniere ni povas variigi la Esperantan stilon kaj ŝpari lingvan materialon.

Jen kelkaj ekzemploj de dialogoj, en kiuj la sintezaj formoj estas anstataŭigeblaj per la enparentezaj disvolvita formoj:

— KIE (en kiu loko) VI LABORAS, KAJ KIE ESTAS VIA (de vi) LABOREJO (loko aŭ domo, kie oni laboras).

— MI ESTAS LABORANTO (iu, kiu laboras), ĈE MAŠINFABRIKO (fabriko por maŝinoj) EKSTERURBA (kiu estas ekster la urbo).

— KIEL (en kiu maniero) VI UZAS VIAN LIBERTEM PON (la liberan tempon)?

— FININTE LA LABORON (post fino; post kiam mi finis la laboron) LA 16-AN HORON (je la 16-a horo) MI PROMENADAS (promenas longdaŭre), KAJ POSTE (en posta tempo) MI IRAS TEATRON (al teatro) AŬ KINEJON.

— KION (kiun ion) ONI PREZENTAS HODIAŬ VESPERE (dum vespero)?

— EN LA HODIAŬA (de hodiaŭ) SPEKTAKLO GASTROLAS (ludas rolon kiel gastoj) PARIZAJ (el Parizo) GRANDTALENTAJ (kiuj estas kun granda talento) KONATAJ (kiujn oni konas) AKTOROJ.

— MI ĜOJAS (estas ĝoja), KE VI KURAĜAS (havas kuraĝon) PAROLI (ke vi parolu) LAŬTE (en laŭta maniero) ESPERANTE (en Esperanto), KAJ TIAL (pro tiu kaŭzo) MI KONSIDERAS VIN BONAĴ LERNANTOJ (ke vi estas bonaj lernantoj).

— ANKAŬ VI ESTAS BONA KURSGVIDANTO (tiu, kiu gvidas la kurson), ĈAR SURBAZE (sur bazo) DE VIA INSTRUMENTODO (metodo de instruado) ONI RAPIDE (en rapida tempo) ELLERNAS (profunde, perfekte lernas) LA BELEGAN (ege, tre belan) LINGVON ESPERANTO (kiu estas nomata Esp.).

☆

Konklude, sur bazo de la specifa strukturo de nia lingvo, ni povas pli racie kaj efike apliki la modernajn psiko-pedagogiajn instru-metodojn, kaj plirapidigi la rektan pensadon en Esperanto.

INTERLINGVISTIKO

D-ro Eugen Wüster atentigas min pri unu grava manko en mia bibliografio pri interlingvistiko ("esperanto"; NOV 67). Temas pri lia epokfara verko:

Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik, Berlin 1931 (431 p.); fotorepreso Bonn 1966. (kp. la recenzon de Paul Neergaard en HdE 11 NOV 66).

Tie en la ĉap. 8 (p. 277-412) li larĝe okupiĝas pri pluraj planlingvoj, kies analizo estas parte nenie aliloke trovebla.

De tiu ĉapitro aperis Esperanta traduko:

Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko (trad. Emil Pfeffer), Budapest 1936 (123 p.).

La verko de Monnerot-Dumaine, kiun mi konas, enhavas tro da eraroj por esti vere rekomendinda. Plej facile konsultebla estas nun E. Drezen (fotorepresita en 1967).

Reinhard Haupenthal,
Sulzbach, Germanujo, 9 jan 68

HELPA LINGVO?

Kun interesiĝo mi legis vian artikolon en la januara kajero de "Esperanto" (vera dulingvismo). Kvankam mi grandparte samopiniis kun vi, pri unu punkto mi havas alian opinion. Forstrecki la esprimon "helpa lingvo" povus doni la impreson, ke ni volus anstataŭigi la naciajn lingvojn per Esperanto, Ankaŭ la esprimo "dua lingvo por ĉiu" certigas, ke Esperanto ne estas danĝero por la naciaj lingvoj.

G. F. Makkink
Wageningen, Nederlando, 22 jan 68

Efektive ŝajnas, ke granda parto de la rezisto al la enkonduko de internacia lingvo devenas de la timo, ke ĝi forpuŝos la naciajn lingvojn.

Estus tasko de niaj informaj fakoj pli konscie kontraŭbatali tiun miskomprenon. Sed mi timas, ke per tiaj esprimoj, kiel "helpa lingvo" kaj "dua lingvo" ni nur anstataŭigas unu malbonan impreson per alia ankaŭ malbona. Parolante pri la Internacia Lingvo ni do ĉiam emfazas, ke ĝi ne devas roli kiel nacia lingvo, same kiel la naciaj lingvoj ne devus roli kiel internacia. — red.

MOTIVOJ DE ĈUNOŜIN JUI

En la januara numero de "Esperanto" mi legis la sciigon pri la brulsinmortigo de la japana pioniro de Esperanto s-ro Ĉunoŝin Jui. Juĝante laŭ tio, kio aperis en aliaj Esperanto-gazetoj pri lia morto, mi opinias, ke per la esprimo "proteste kontraŭ la registara politiko" estas prisilentataj la veraj motivoj de s-ro Jui.

Roberto C. Groeneveld
Amsterdam, 12 jan 68

Laŭ "La Revuo Orienta", s-ro Jui postlasis "leteron al s-ro Eisaku Sato, la ĉefministro. Per tio li protestis kontraŭ la ĉefministro pro tio ke 1-e la leĝpropono reguligi politikan kapitalon estis abortinta, 2-e s-ro Sato iros al Usono antaŭsciante rifuzon de Usono pri la redono de Okinawa kaj Ogasawara, kaj 3-e la ĉefministro subtenas la bombadon de Usono kontraŭ Nord-Vjetnamio, malgraŭ ke Japanujo povas influi por haltigo de la bombado." — red.

LASTMOMENTE: NORDA PRISMO

Kiel nova ĉef-redaktoro de la kvaronjara kultura revuo Norda Prismo enoficiĝis s-ro William Auld (20, Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Skotlando), la iama redaktoro de "Esperanto", "Monda Kulturo" k.a. La informo en la februara "Esperanto" sekve ne plu validas.

Brilo de fantomo, originala novelo de Margid Thoræus-Ekström. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 71 p. 21 x 15 cm.* 4,50 gld.

La nova libro de sveda verkistino Margid Thoræus-Ekström "Brilo de Fantomo", originale verkita en Esperanto, ne estas tipa fantoma rakonto, kiel oni povus supozi laŭ ĝia titolo, kvankam oni trovas en ĝi kelkloke ankaŭ ion similan.

La enhavo estas simpla: la heroino de la rakonto konfesas al iu sian vivon, komence de infaneco, rakontas pri la sorto de sia patrino, montras la karakteron de sia patro, kiu ĉiam serĉis novajn amatinon ktp. Gravan lokon en la rakonto okupas la internaj travivaĵoj de la heroino, kiuj kelkfoje ŝajnas sentimentalaj.

Kvankam la verkistino en sia rakonto ne analizas gravajn psikologiajn problemojn, ne surprizas per eksterordinaraj situacioj kaj okazintaĵoj, tamen la libron oni povas legi kun granda interesiĝo. Tio ankaŭ estas la ĉefa merito de l'aŭtorino. Ŝi verkas en bona, lerta, ni diru eĉ eleganta Esperanto-stilo.

Mirdza Burgmeister (Latvuj)

Preĝo. Ho donu al mi vastan koron! Versaĵo de Teo Jung. Eld. Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1967. 15 p. 17 x 11 cm. 1,50 gld.*

Emocia versa alvoko, tre taŭga por patosa deklamado, pri la eterne grava temo de homfratiĝo kaj universala amo. La vers- kaj rimteĥniko de la aŭtoro estas bonaj kaj sukcesaj; estas domaĝe, ke ĝuste en la fino, kiam devus okazi kresĉendo, liaj figuroj eklamas kaj banaliĝas. Sed tio finfine ne senvalorigas verkon indan je populareco.

William Auld (Skotlando)

Monosilaboj, 14-silaboj sonetoj de Diderto Freto. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1967. 45 p. 19 x 14 cm.*

Tiu ĉi poeto ekhavis la ideon, verki poemojn konsistantajn el po 14 unusilabaj vortoj, ekz-e: Ĝis nun, la hom': sklav' de l' ŝtat'. Tuj la ven' de l' vol' kun plen'! (Pli trafe aspektas, kun la vortoj aranĝitaj unu sub alia!) Tio signifas, ke en la poemoj tute mankas verboj kaj adjektivoj — kio donas specialan tonon al ĉi poemoj, tonon de nuda senartifiko. Ankaŭ lia temaro estas malvastgama. Sed kun ĉiuj arbitraj limigoj, la poemformo estas trafa kaj vivkapabla, kaj la kutimiĝinta orelo aprecas liajn variantojn. Leginda maloftaĵo. (Interesa propono: lesto = oriento, anstataŭ la jama propono: easto.)

William Auld (Skotlando)

Katalogo pri Esperanto-poŝtmarkoj, de Váňa vladimir. Eld. EKIK, Malmö, 1967. 21 p. 30 x 21 cm., multobl., ilustr. 4,50 gld. (18 st.)*

Post la eldono de katalogo pri Esperanto-poŝtmarkoj, EKIK nun eldonis tiun katalogon, kiu listigas la poŝtmarkojn rilatantajn al Esperanto. Ĉe la komenco estas la bildoj de tiuj p.m., kio estas tre utila. Poste la listo aperas laŭ la datoj de eldono, kio ebligas facilan kompletigon. Por ĉiu p.m. oni trovas ankaŭ la tekston, la numeron laŭ Yvert, la valoron, kolorojn kaj klarigojn. Je la fino estas jam Aldono, kiu kompletigas la informojn, kaj ankaŭ listo de unuatagaj kovertoj. Paŝon post paŝo oni alvenas al kompleta katalogo pri la temo "Esperanto".

Jack A. Rousseau (Parizo)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Bone! Poemo de l' Oktobro, de Vladimir Majakovskij. El la rusa tr. K. Gusev. Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, 1967. 108 p. 20 x 14 cm., ofsetita. 0,75 gld.*

La mondpercepto de la modernaj natursciencoj. Prelegoj de la 10-a Int. Seminario de GEJ. Eld. Pickel, Nürnberg, 1967. 170 p. 21 x 13,5 cm., ilustr. 8,75 gld. (35 st.)*

1968 (Kalendaro). Eld. "El Popola Ĉinio", Pekino, 12 p. 38 x 33 cm., kolorfotoj.

Kelkaj problemoj pri metodoj de gvidado, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 8 p. 15 x 9,5 cm. 0,25 gld.*

Frakasu grandan Uson-Sovetunian konspiron! Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 12 p. 14 x 9,5 cm. 0,25 gld. (1 st.)*

Perfido al la proleta diktaturo estas esenca elemento de la libro "Memkulturo". Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 18 p. 14,5 x 9 cm. 0,25 gld. (1st.)*

Simpozio (Bankedo) de Platon. El la helena tr. Sokratis Sakellaropoulos. Nova (2-a) eld.

reviziita, la trad., Ateno, 1967. 76 p. 22 x 16 cm., ofsetita. 3,— gld.*

Il-maŝina nomenklature en ses lingvoj (EAFGHI), de Edward M. Rosher. Eld. la aŭtoro, Britujo, 1968. 10 p. 25 x 20 cm., multobl.

Vivu la venko de popola milito, de Lin biau. 2-a eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1967. 56 p. 18,5 x 13 cm.

Patromurdo en la nigra muelejo, de István Ráth-Végh. El la hungara tr. Maria Benczik. Eld. Hungara Esperanto-Junularo, Budapeŝto, 1967. 47 p. 14 x 10 cm.*

Konversacia Esperanto-Kurso, de d-ro Szilágyi. Represo 1968, Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. 69 p. 22 x 15 cm., ilustr., ofsetita.*

CITAĴO

Reuter (12 jan 68): "La franca fiŝkapta ŝipo Fomalhaut enretigis britan submaran ŝipon Grampus. La elretigo poste daŭris tri horojn, i.a. pro lingvaj obstakloj. Aviadilo de la franca aerarmeo alflugigis interpretiston, kiu sukcesis interpreti el la aero per radio."

LOKE

Bulgarujo

• La plej altan bulgaran ordenon por merito en la sfero de kulturo, klerigo, arto kaj scienco la prezidantaro de la Bulgara Parlamento aljuĝis al Bulgara Esperantista Asocio okaze de la 60-jara datreveno de ĝia fondo: la ordenon "Kiril i Metodij" de la unua grado. Samokaze la Nacia Biblioteko en Sofio prezentis Esperanto-ekspozicion (foto).



Hindujo

• Okaze de vizito de ĉef-ministrino Gandhi, studentoj en Varanasi manifestaciis kontraŭ la konservado de la angla kiel oficiala lingvo apud la hindia. La polico anticipe arestis gvidantojn de la partio Sammukta, kiu kontraŭas la oficialecon de la angla.

Kanado

• La unua volumo (el dek) de la rekomendoj de la Reĝa Komisiono Enketa pri Dulingvismo kaj Dukulturismo, aperinta la 5-an de decembro 1967, proponas reformojn por fari la francan lingvon vere egalranga kun la angla, ne nur en la federaciaj institucioj kaj en la oficiale dulingvaj provincoj Ontario kaj Nova Brunswick, sed ankaŭ en ĉiuj regionoj, kie la franclingvanoj konsistigas almenaŭ 10% de la loĝantaro. La Komisiono nomas la nunan situacion "grava krizo en la historio de Kanado".

Malio

• Dum la tre aŭskultata junulara programo "Sur le front de la jeunesse" la ŝtata radio en Bamako elsendis je la 13 jan 1968 intervjuon pri Esperanto kun Ibrahim Sori Tambura, membro de la Afrika Komisiono de TEJO.

Unuigintaj Nacioj

• Komence de decembro 1967 la Buĝeta Komisiono de UN akceptis per 73 voĉoj kontraŭ 9 (inter kiuj Usono) kaj 26 sindetenoj (inter kiuj Britujo) proponon de Francujo kaj 35 aliaj ŝtatoj, ke la franca lingvo estu uzata egalrange kun la angla ne nur en publikaj sesioj sed ankaŭ en ĉiuj internaj UN-laboroj.

FAKE

Medicino

• Resumojn en Esperanto — apud la franca, germana kaj hispana — enkondukis la angla-lingva revuo "Medicamundi" ekde vol. 12 n-ro 2, 1967. La revuon, dediĉitan al radiologio kaj parencaj fakoj, eldonas la firmo Philips en Nederlando.

Scienco

• La Estraro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) decidis deponi la bibliotekon de ISAE en la kadro de la Universitata Biblioteko de Toruń, Pollando, de kie la materialoj estos prunteblaj eksterlanden.

PERSONE

Cool

• Ankoraŭ unu tre internacian geedziĝon peris Esperanto: en Québec, Kanado, edziniĝis la 30-an de decembro dumviva membro de UEA f-ino Florence Côté el Québec kun s-ro G. Cool, nederlandano, fak-delegito en Goldern, Svisujo. La ceremonion, tute en Esperanto, kondukis pola misiisto pastro Boglary. Festparolis la prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio.

Fernández

• En marto festas sian okdekjariĝon prof. Manuel Fernández-Menéndez, Montevideo, honora membro de UEA. Li lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj, do — duobla festo.

Tonkin

• En marto 1968 geedziĝas la ĝenerala sekretario de TEJO, d-ro Humphrey Tonkin, kun JEN-sekretariino Julie Crandall.

NEKROLOGOJ

ROMAN WULCZEK (1897-1967)

La 17-an de novembro mortis s-ro Roman Wulczek, delegito en Rzeszów, Polujo, kaj membro de UEA jam de 1925. Li estis dum multaj jaroj prezidanto de la loka societo.

ERWIN H. ZUBER

La 14-an de januaro mortis vicprezidanto de Svisa Esperanto-Societo s-ro Erwin Zuber, dumviva membro de UEA kaj delegito en Langnau. Li estis nur 48-jara.

ARTHUR REGINALD CAMPBELL (1898-1968)

Neatendite mortis la 1-an de januaro s-ro A. R. Campbell, delegito de UEA en Belfast, Britujo. Li estis malnova membro de UEA kaj longe prezidis la Belfastan Esperanto-Societon.



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperanto Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

KONTAKTO ELKRIZIGIS !

La revuo de TEJO eniras sian kvinan jaron
Kiel rimarkis la fidelaj legantoj de "Kontakto", dum la pasinta jaro ilia revuo ne regule aperis. La amase ricevitaĵaj demandoj pruvis al ni la simpatian, kiun ĝuas Kontakto, kaj la estraro de TEJO des pli bedaŭras la malregulecon.

Sed jam Kontakto reprenis la kutiman takton: aperis jam numeroj 1, 2 kaj 3 rapide unu post la alia. Ili montras altnivelan enhavon kaj pli viglan tipografion. Dum ĉi tiu jaro, la kvina de sia ekzistado, ĝi reakiros la regulan aperadon. Ĝi plene servos al sia celo: esti vere internacia junulara gazeto per Esperanto. Ĝi tamen ne aplikas la aĝlimon kutiman en TEJO: aboni kaj legi ĝin povas ĉiu kiu sentas sin juna.

Nova redaktoro de Kontakto (ekde n-ro 2/1968) estos Mag. Roman Dobrzynski, Varsovio, aŭtoro de universitata tezo pri "La Esperanta gazetaro" kaj profesie redaktoro de pola ilustrita revuo por studentoj, "itd". Daŭrigante la agadon de la antaŭaj redaktoroj, Humphrey Tonkin kaj Stefan Maul, li altiros sendube novajn abonantojn al la revuo.

Kiel akiri Kontakton? Tutjara abono (4 numeroj) kostas 8 ned.gld. Sed gejunuloj multe profitas elektante alian metodon: ĝis (inkl.) 21-jaraj aliĝas al UEA kiel Juna Membro-Abonanto (JMA), pagas po 18,75 gld. ĉiujare, kaj ricevas la Jarlibron, la revuojn "Esperanto" kaj "Kontakto". 22- ĝis (inkl.) 25-jaraj aliĝas kiel Membro-Abonanto kun Kontakto (MAK), pagas 25 gld. kaj ricevas la samon kiel JMA.

Plenaĝulo, kiu volas subteni la agadon de TEJO (vidu la ĉefartikolon sur p. 33), povas iĝi Patrona Membro A per ĉiujara kotizo de 16 gld., ricevante Kontakton kaj – laŭpete – materialojn pri la agado de TEJO. Nur tiujn materialojn ricevas, se li deziras, Patrona Membro B, per kotizo de 5 gld. Ĉiujn aliĝojn kaj pagojn akceptos UEA aŭ ĝiaj landaj perantoj.

La estraro de TEJO kore invitas ĉiujn gejunulojn partopreni, kaj ĉiujn pliaĝulojn apogi la junularan movadon, kiu disvolvas viglan agadon kaj per pli da financaj rimedoj kaj membroj povas fari eĉ multe pli. U. Lins

TARRAGONO

Laŭ cirkulero de LKK de la 24-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, la mirinda Universitata Laborejo en Tarragono gastigos la

kongresanojn. Tie ili povos ĝui ĉiutage belajn pejzaĝojn, brilan kaj varman sunon, marajn ondojn kaj bongustajn manĝaĵojn. La programo estos samtempe amuza kaj interesa, ĉar ĝi kombinas la laborkunsidojn, prelegojn kaj aŭtoritatajn vizitojn kun ekskursoj, balo, sporta ĉampioneco, futbalo, naĝado, ktp.

Nova aranĝo estos la inaŭguro de la HEF-"Junulara Restadejo Esperantista" en Monistrol de Montserrat, organizita kaj parte konstruita de la HEJS-membroj. Ĝi estos je dispono de ĉiuj esperantistoj. Post la inaŭguro oni vizitos la mondfaman montaron Montserrat, kie staras baziliko enhavanta multvaloraĵajn trezorojn kaj literaturaĵojn.

Petu la cirkuleron kun aliĝilo de S. Aragay, str. Arce 8-2-4, **Cornella** (Barcelono).

AIX-EN-PROVENCE

La cirkulero, kiu anoncas la 3-an Kongreson de STELO de 13 ĝis 20 aŭg., en Aix-en-Provence, promesas tiel allogi programon, ke ni nur povas rekomendi al ĉiu esperantista studento en la propra intereso tuj skribi al Studenta Esperantista Rondo, 28 rue Portalis, 13 **Aix-en-Provence**, por akiri tiun Unuan Oficialan Informilon, antaŭ ol la stoko elĉerpiĝos.

ESSEX

Inter la notindaj lastatempaj sukcesoj de SEL, la Skolta Esp.-Ligo, ni notas ĉi tie la akcepton de Esperanto kiel dua lingvo en brita ĵamboreo: la 6-a "Essex International Jamboree" en Belchamps, Hawkwell ĉe Southend, 27 julio ĝis 3 aŭg. 1968. Esperantistaj skoltoj – profitu vian ŝancon partopreni, ĉu individue, ĉu grupe, kaj petu informojn de la sekretario: Barrie Clarck, 23 Wordsworth Road, Coventry. Bonvolu ankaŭ informi la sekr-on de SEL, J. K. Hammer, pri viaj planoj; li loĝas: Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

PROGRAMO PASPORTO

Laŭ ĝia ĵusaperinta jarraporto, Programo Pasporto ricevis kaj respondis 63 informpetojn (el kiuj 5 laŭ la regularo), 50 gejunuloj anoncis sin por esti gastoj, 28 familioj anoncis sian pretecon gastigi. En 1968 "Pasporto" ekfunkcios, organizante gastigadon kaj interŝanĝadon de junaj gastoj en la tuta mondo. Vi povas apogi tiun sistemon ĉefe per varbo de unu gastiganto, tio estas familio, kiu pretas dum iom da tempo senpage akcepti junan eksterlandan gaston, esperantiston, kiel familianon. Programon Pasporto gvidas R. Feldman, Bv. Oroño 866-A **Rosario**, Argentino.

Aperis ofsetita broŝuro pri volontulaj labor-tendaroj, kie oni uzas aŭ instruas Esp-on. Ĝi ankaŭ anoncas pedagogian seminarion por instruantoj kaj helpantoj en la Esp.-kursoj. La seminario okazos en Marseille/Aix, dum la JEFO-kongreso je Pasko. Adreso: J-M. Liouville, 6 rue Léon Vaudoyer, Paris 7-e.

RADIO-ELSENDOJ EL FILIPINOJ

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

RADIO MANILA en la Filipinaj insuloj, per ondoj de la stacio Far East Broadcasting Company, ek de la 7-a de marto dissendos programon en Esperanto. La enhavo estos kristanaj prelegoj. Ondlongo: 25.17 m (11920 kcs). Ĵaŭde de 11.00 ĝis 11.15 kaj dimanĉe de 21.45 ĝis 22.00 (GMT). Krom en la propra lando, la stacio estas precipe aŭdebla en Japanujo, Rjukju-insuloj, Suda Koreujo, Siberio.

RADIO ROMA. 3-III, Tra la literaturo; 10-III, Novaĵoj el Italujo; 17-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-III, Leterkesto; 31-III, Kristana mondo; 7-IV, La itala verkisto Eugenio Montale; 14-IV, La insulo Elbo; 21-IV, La itala arkitekto Francesco Borromini; 28-IV, La urbo Como kaj ĝia lago. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: S-ro Luigi Minnaja.

RADIO BRATISLAVA ek de la 8-a de januaro dissendas Esperanto-kurson ĉiun lundon de 17.30 ĝis 17.40 kaj ĉiun merkredon (ripeto de la lunda programo) de 9.45 ĝis 9.55 (GMT). Ĉiun alternan semajnon estos disaŭdiĝataj slovaklingvaj novaĵoj kaj respondoj pri Esperanto en daŭro de 5 minutoj. Ondlongoj:

273 m (1097 kcs), 243 m (1232 kcs), 427 m (701 kcs), 188 m (1594 kcs). La aŭtorino de la kurso estas Dr. Magda Šaturová. Adreso de la stacio: Redakcio de RADAR, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo. Pasintjare la sama radiostacio elsendis slovaklingve 55-minutan literaturan programon pri D-ro Zamenhof preparitan de Dr. Šaturová je oficiala deziro de la radiostacio Bratislava.

BRITA RADIO dum la franclingva tagmeza programo de la dimanĉo 21-a de januaro respondis al aŭskultanto pri Esperanto en Britujo. Kvinminuta raporto bone resumis la situacion. Inter ĝeneralaj faktoj pri la temo, estis citataj la venonta nacia kongreso en Manchester kaj la pasintjara serio de esperant-lingvaj elsendoj dum la bulgara programo de B.B.C. Tiu raporto destinita por franclingvanoj finiĝis per listo de francaj literaturaj verkoj tradukitaj en Esperanto.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 Rotterdam, la 30-an de jan. 1968

Dua Bulteno

La Loka Kongresa Komitato povas plenumi la mendojn de la kongresanoj pri loĝado, ekskursoj, bankedo ktp., nur se tiuj estas faritaj pere de la mendiloj troviĝantaj en la Dua Bulteno.

Limdato

Ni atentigas, ke la lasta limdato por aliĝo al la Universala Kongreso estas la 25-a de junio 1968. Post tiu dato aliĝoj ne plu estos traktitaj, kaj la aliĝkotozito restos je dispono de la paginto. En esceptaj kazoj LKK rajtas akcepti aliĝojn dum la kongresa semajno, sed tiam la aliĝanto devas krompagi la sumon de 25,— gld. sendepende de la kotiza kategorio. Por aliĝantoj dum la Kongreso LKK ne certigas la liveron de la kongresaj dokumentoj.

Fervoja rabato

Kun la Dua Bulteno estas sendita al ĉiuj aliĝintoj loĝantaj en Eŭropo speciala karto, per kiu ili ricevas la rajton ĝui 25%-an rabaton je aĉeto de fervoja revenbileto al Madrid. La karton akompanas detalaj klarigoj pri ĝia uzo.

Foto-Konkurso

La limdato por la sendo de konkursaĵoj estas fiksita je la 1-a de julio 1968.

Statistiko (je 12 feb 68)

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstrujo 10, Bel. 24, Bra. 4, Bri. 59, Bul. 24, Ĉeĥ. 11, Dan. 17, Fin. 12, Fra. 133, Ger. 42, Gre. 1, His. 224, Honk. 2, Hun. 12, Isl. 2, Isr. 5, Ita. 42, Jap. 11, Jug. 77, Kan. 3, Meks. 2, Monako 4, Ned. 40, Nor. 9, NZ 1, Pol. 17, Portu. 14, Sov. 1, Sve. 25, Svi. 5, UAR 1, Uru. 1, Usono 22. Entute: 862 el 35 landoj.



INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

stato je la 31-a de januaro 1968

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1 (6) Nederlando	5322	3105	58,34
2 (10) Usono	4144	2115	51,04
3 (8) Danlando	2764	1375	49,75
4 (7) Svedujo	6415	2965	46,22
5 (13) Svislando	1949	900	46,18
6 (1) Japanujo	3829	1680	43,88
7 (9) Germanujo	6579	2760	41,95
8 (4) Francujo	7234	2949	40,77
9 (14) Brazilo	3188	1183	37,11
10 (12) Finnlando	2608	920	35,28
11 (2) Hispanujo	2919	960	32,89
12 (15) Jugoslavio	3792	1220	32,17
13 (3) Italujo	3816	1105	28,96
14 (5) Belgujo	1912	540	28,24
15 (11) Britujo	6095	55	0,90

Konkurso II

1 (2) Kanado	955	615	64,40
2 (3) Israelo	488	235	48,16
3 (5) Aŭstrujo	1270	535	42,13
4 (11) Madagaskaro	250	99	39,60
5 (7) Sudafriko	250	75	30,—
6 (8) Novzelando	1265	375	29,64
7 (9) Norvegujo	1460	405	27,74
8 (10) Argentino	693	155	22,37
9 (4) Islando	250	40	16,—
10 (1) Grekujo	250	20	8,—
11 (6) Aŭstralio	1327	65	4,90

(Vidu la regulojn sur paĝo 31. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn).

LAŬLANDA MEMBRO-STATISTIKO 1967

Lando	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	Sumo	AM	Entute
Albanujo	—	2	—	—	—	—	—	—	2	—	2
Alĝerio	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—	2
Antiloj	—	1	—	—	—	—	1	—	2	—	2
Argentino	1	25	—	12	—	1	1	2	42	200	242
Aŭstralio	24	91	3	18	—	1	1	—	138	129	267
Aŭstrujo	12	81	3	7	2	—	2	3	110	300	410
Belgujo	21	95	8	12	1	3	4	2	146	500	646
Brazilo	17	168	20	34	1	1	4	4	249	357	606
Britujo	88	333	37	85	4	7	10	10	574	824	1398
Bulgarujo	6	102	—	4	—	3	5	3	123	4100	4223
Cejlono	—	2	—	2	—	—	—	—	4	—	4
Ĉeĥoslovakujo	4	185	—	8	1	—	2	3	203	—	203
Ĉilio	—	—	—	1	—	—	—	1	2	—	2
Ĉinujo	—	6	—	—	—	—	—	—	6	—	6
Danlando	33	130	17	10	—	—	4	1	195	816	1011
Etiopujo	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—	2
Filipinoj	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Finnlando	67	163	11	14	1	5	11	5	277	—	277
Francujo	75	430	16	67	5	10	10	14	627	1489	2116
Gano	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—	1
Germanujo	73	322	24	51	—	2	14	10	496	1710	2206
Grekujo	1	15	—	—	—	—	—	1	17	200	217
Gvatemalo	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Hindujo	—	11	—	—	—	—	—	—	11	—	11
Hispanujo	22	201	3	19	—	1	8	3	257	490	747
Honkongo	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—	2
Hungarujo	1	67	—	—	2	4	6	10	90	3100	3190
Indonezio	—	8	—	—	—	—	—	—	8	—	8
Irako	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—	1
Irano	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—	1
Irlando	—	2	—	2	—	—	1	1	6	—	6
Islando	—	21	—	4	—	—	—	—	25	—	25
Israelo	3	35	1	5	—	—	—	3	47	160	207
Italujo	29	222	5	12	—	—	12	5	285	1100	1385
Japanujo	12	202	1	8	1	2	11	9	246	1400	1646
Jugoslavio	16	154	4	14	—	2	14	8	212	1500	1712
Kamboĝo	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Kameruno	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Kanado	17	56	7	11	—	1	3	5	100	286	386
Kenjo	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—	1
Kipro	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Kolombio	—	11	—	—	—	—	1	1	13	—	13
Kongo (Dem. Resp.)	—	11	—	—	—	—	2	2	15	25	40
Koreujo	—	15	3	—	—	—	1	2	21	—	21
Kostariko	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—	1
Kubo	—	4	—	1	—	—	—	—	5	—	5
Libano	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Liĥtenstejno	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Luksemburgo	1	—	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Madagaskaro	—	7	—	—	—	—	3	2	12	23	35
Malio	—	1	—	—	—	—	—	1	2	—	2
Malto	—	2	—	—	—	—	—	—	2	—	2
Maroko	—	—	—	2	—	—	—	—	2	—	2
Maŭritanio	1	—	1	—	—	—	—	—	2	—	2
Meksiko	1	13	—	3	—	—	—	1	18	—	18
Monako	3	7	—	—	—	—	—	—	10	—	10
Mongolujo	—	3	—	—	—	—	—	1	4	—	4
Mozambiko	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Nederlando	63	320	16	74	3	1	12	13	502	811	1313
Norvegujo	13	69	4	15	—	—	—	—	101	451	552
Nov-Zelando	30	57	6	26	—	1	4	—	124	223	347
Peruo	—	—	—	1	—	—	1	—	2	—	2

eranto
rto 1968

Lando	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	Sumo	AM	Entute
Pollando	1	291	—	9	—	—	6	5	312	3100	3412
Portugalujo	2	12	—	3	3	—	—	—	20	—	20
Rumanujo	1	35	—	—	—	5	—	3	44	—	44
Senegalio	—	4	—	—	—	—	1	—	5	—	5
Solomon-Insuloj	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Soveta Unio	1	119	—	1	—	—	11	6	138	—	138
Sudafriko	3	16	1	7	—	—	—	1	28	—	28
Sudano	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Svedujo	123	316	78	39	1	3	7	7	574	1000	1574
Svislando	92	91	5	46	1	—	2	3	240	90	330
Tanzanio	—	4	—	—	—	—	—	—	4	—	4
Turkujo	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
U.A.R.	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—	2
Urugvajo	—	5	—	2	1	—	—	—	8	50	58
Usono	43	243	26	77	2	6	19	9	425	280	705
Venezuelo	—	10	—	—	—	—	—	—	10	—	10
Zambio	—	1	—	—	—	—	—	—	1	—	1
79 landoj	900	4812	301	714	29	59	194	160	7169	24714	31883

KONSIDEROJ PRI LA MEMBRO-STATISTIKO

La membrostatistiko montras la kutiman bildon de ege malegala disdivido de la membraro inter la diversaj landoj. La ciferoj por la unuopaj landoj ĝenerale malmulte ŝanĝiĝas, sed ĉi-jare ili montras preskaŭ ĉie malgrandan regreson. Tiuj malgrandaj landaj regresoj kune signifas tamen kelkajn centojn por la tuta mondo. La ciferoj restas sub tiuj de la antaŭa jaro per entute 279 asociaj kaj 345 individuaj membroj.

Koncerne la asociajn membrojn la kaŭzo troviĝas en Sud-Ameriko, kie Argentino kaj Brazilo perdis multajn membrojn pro internaj malfacilaj cirkonstancoj.

Rilate la individuajn membrojn, unu el la kaŭzoj sendube estas la kotizaltigo okazinta je 1.1.67, kiu tamen estis neevitebla.

Ĝojigan kreskon la statistiko montras en la kategorio de dumvivaj membroj. Post kresko de preskaŭ 100 DM en 1966, kiam oni povis profiti ankoraŭ la malnovan kotizon, en 1967 okazis plua kresko de 46 DM. Ĉiam pli da membroj komprenas la avantaĝon membriĝi en tiu kategorio, kiu certigas al ili la membrecon ankau en malproksima estonteco, kiam eble iliaj financaj rimedoj estos pli modestaj.

Grava fakto estas, ke malnovaj membroj maljuniĝas kaj forfalas, dum el la junularo ne venas la atendata nova alfluo. Tial necesas, ke TEJO forte instigu siajn landajn sekciojn al plej energia varbado. La nombro de J-MA malkreskis kaj en 1966 kaj en 1967. Tiu de MA-K post malgranda kresko en 1966 nun refalis denove eĉ sub la nombro de 1965. El la landoj kun bone organizita movado Norvegujo havas eĉ ne unu membron en la junulaj kategorioj! Okazis en la pasinta jaro 20 pli aŭ malpli grandaj junularaj renkontiĝoj. Se en tiaj aranĝoj funkciuloj de TEJO faras informajn paroladojn, devas esti eble varbi multajn junajn membrojn.

En 1968, la Jaro de la Homaj Rajtoj, UEA lanĉas novan kampanjon, Por la Internacia Lingvo, Kontraŭ Lingva Diskriminacio. Paralele okazas kampanjo por energia membro-

varbado, por ke tiu ĉi jaro, kiu estas ankaŭ la jaro de la 60-jara jubileo de UEA, finiĝu per rekorda membronombro. Restas 24 714 asociaj membroj varbendaj kiel individuaj membroj. Estas vere, ke pluraj miloj el ili troviĝas en landoj kun tre limigitaj pageblecoj, sed aliaj miloj troviĝas en tuta aro da landoj kun bone organizita movado kaj libera valuto. Tamen, en tiuj landoj nur malgranda parto de la tuta membraro estas individuaj membroj de UEA, ekz. en Aŭstralio (51 %), Aŭstrujo (25 %), Belgujo (22 %), Britujo (40 %), Danlando (20 %), Francujo (30 %), Germanujo (23 %), Italujo (20 %), Japanujo (15 %), Kanado (25 %), Nederlando (37 %), Norvegujo (18 %), Novzelando (33 %), Svedujo (36 %), Svislando (73 %). El la menciitaj landoj Svislando estas aparte laŭdinda, sed el ĉiuj aliaj nur Aŭstralio havas pli ol 50 % da individuaj membroj inter sia membraro. Estas klare, ke en ĉiuj aliaj landoj granda tereno estas ankoraŭ prilaborenda. Kiel ekzemplo estas menciinda Finnlando, kie 100 % de la asocia membraro estas individuaj membroj de UEA!

Fine, ni volonte instigas niajn izolitajn membrojn en landoj sen organizita movado, kie ili estas nur kelkope aŭ eĉ tute solaj, fari ĉiajn klopodojn, pere de kursoj, informado ktp, por kreskigi la tiean esperantistaron kaj por trovi jamajn esperantistojn tie ekzistantajn sed ne organizitajn.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Aŭstralio. Melbourne: FD (Kino) & (Aŭtoservo).

Belgujo. Antwerpen: D.

Brazilo. Rio de J.: FD (Arkitekturo), (Radio).

Britujo. Belfast.

Danlando. Frederikshavn, Randers.

Francujo. Crest: FD. Lille: FD.

Germanujo. Göttingen: FD. Hildesheim: D.

Neuss. Sulzbach: VD, JD kaj FD (Lit.).

Hispanujo Manresa. Valencia: FD (Inĝ.).

Indonezio. Djakarta.

espera
marto 1968

Italujo. Pisa. Torino: D & FD (Jurnalismo).
Pollando. Rzeszów. Warszawa: D & FD (Bankoj).
Portugalujo. Lisboa: FD (Muziko).
Svedujo. Malmö: VD Henriksson. Övertorneå.
Urugvajo. Montevideo: JD.
Usono. Ann Arbor.Sacramento: D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Chefd'homme, f-ino Françoise, Francujo.
 Chefd'homme, f-ino Jacqueline, Francujo.
 Gemmell, s-ino S., Dunedin, Nov-Zelando.
 Maestro, d-ro Leone, Firenze, Italujo.
 Muizelaar-Berger, s-ino B., Nederlando.
 Stourm, s-ino Paulette, Madagaskaro.

Aparte atentindan ekzemplon donis ĉi-monate s-ro Marcel Chefd'homme, Francujo, per dumviva membrigo de siaj tri filinoj Françoise, Jacqueline, kaj Paulette Stourm. Kiu sekvos?

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

82 Camarasa, s-ro E. A., Argentino. 83 Boffejon, s-ro Hector; 84 Geers, f-ino Blanche; 85 Verstraeten, s-ro Jules, Belgujo. 86 Almada, s-ro F. S.; 87 Araujo, f-ino I. Baggi de; 88 Bleisher, s-ino Fanny; 89 Domingues, d-ro C.; 90 Pádua, gen. Geraldo; 91 Pauluk, s-ro José; 92 Pessoa, s-ro Floriano N. de V.; 93 Pinto, s-ro José Dias; 94 Rabêlo, s-ro Álvaro; 95 Rezende, d-ro C.; 96 Silva, s-ro Paulo Vieira da; 97 Vaz, s-ro A. J.; 98 Verde, s-ro Deoclecio Lima, Brazilo. 99 Ihander, f-ino Olga Maria; 100 Jakobson, s-ino Ulla; 101 Miettinen, s-ro Erkki; 102 Stoor, s-ino Brita, Finnlando. 103 Pera, s-ro Jean; 104 Romano-Joly, s-ro M., Francujo. 105 Lacalendola, prof. A.; 106 Minnaja, s-ro L., Italujo. 107 Kuhl, s-ro Jurgen P. F., Kanado. 108 Coppens-Bink, s-ino A. B. M.; 109 Hoekma, s-ro A. G.; 110 Luyke, s-ro H. C.; 111 Ponti, s-ro D. M., Nederlando. 112 Dewar, s-ro G. D., Nov-Zelando. 113 Ahlin, s-ro E. V.; 114 Andersson, s-ro B.; 115 Brandemar, s-ro Nils; 116 Emson, s-ino R.; 117 Gustafsson, s-ro Karl E.; 118 Jensie, s-ino Märta; 119 Julin, s-ro Teodor; 120 Lagerkrantz, s-ro L.; 121 Lindberg, s-ro E.; 122 Rydberg, s-ro Henry; 123 Sjöberg, s-ro H.; 124 Svård, s-ino Rut; 125 Tell, s-ro Leander, Svedujo. 126 d'Estries, s-ino M.; 127 Simon, s-ro W.; 128 Simpson, s-ro W. P., Usono.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.-28. de julio en la internacia altlernejo (tute moderna) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
 Ingemannsvej 9,
 Åbyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ, (13.-19. de oktobro) ĉe Århus, Danlando. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Michalik, s-ino F., 27,45. Italujo: Rossino, s-ro A., 2,80. Nederlando: N.N., 78,50; Kat, s-ro F. H., 22,50; Leenhard, s-ro A., 18,—; Moerbeek, s-ro R., 50,—. Svedujo: N.N., 1041,75. Usono: Fineberg, s-ro A., 8,10; Murray, J., 36,—.

POR VASTIGO DE LA AGADO (Gld.)

Nederlando: Burg, s-ro E., 2,50. Svedujo: Edler, s-ro P., 60,—.

FONDAJO CANUTO

Britujo: Lapenna, prof. I., 4 MA. Germanujo: Kruse, s-ro E., 1 MJ; Wilcke, s-ro H., 1 MA. Svedujo: N.N., 14 MA; Walden, f-ino Klara, 1 MA.

FONDAJO AZIO-AFRIKO

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 50,— gld. (Por Konga Esperanto-Instituto).

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
 M. H. Vermaas,
 Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

Salutu la 55-an Japanan Kongreson, 3-4 aŭg. '68! Adreso: Sapporo-Tyûô-Kyoku Sisuyobako 281, Japanujo.

Intersteno. Mi korespondas interstene kaj donas tre volonte informojn pri Intersteno. Skribu al s-ro Walter Lager, Lutterottstr. 2, A-6020 Innsbruck (Aŭstrujo).

Estimata rentulino, se vi parolas Esperante kaj NE komprenas la germanan lingvon, tiam venu al la Lazura Marbordo. Skribu al Robert Stoffers, Villa "Tabou", F-13-Cassis, Francujo.

Religia kaj katolika literaturo estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libroliston.

Kial Ne? La inteligenta Esperanto-gazeto por modernaj gejunuloj. Leginda — pensiga — satirema. Unuvorte — la sola gazeto por raciaj homoj. Jarkotizo: 20 steloj/10 ŝilingoj. 'Kial Ne?', 2 Edwina Gardens, Redbridge, Ilford, Essex, Anglujo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

Ĉu vi estas preta korespondi en Esperanto kiel "onkl(in)o" kun alilanda infano? Skribu al: s-ro J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston (Manchester), Britujo.

H. C. ANDERSEN

"FABELOJ"

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof

53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo.
Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por
aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon enteni-
tan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos
rabaton de 0,30 us. \$.

Prezo: 3 us. \$ (+ 10 % por sendokostoj)



Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA

Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 47 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj

Jus aperis la prelegoj de la 10a Internacia Seminario de GEJ en la Serio I "Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo" kiel libro sub la titolo:

La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj

Tiu libro estas grava kontribuaĵo al la scienca literaturo en Esperanto. Ĝiaj aŭtoroj, konataj fakuloj, devenas el 8 landoj:

B. Popović, Jugoslavio, Rigardo en la Mikro- kaj Makrokosmon

V. Peevski, Bulgario, Natursciencaj Fundamentoj pri Kosmonaŭtiko kaj Pac-Cela Utiligo de Satelitoj

Ivo Lapenna, Britujo, Internaci-Juraj Problemoj de Spacveturado

Adam Gula, Pollando, Elementaj Korpuskloj kaj la Strukturo de Materio

Wim de Smet, Belgujo, Nunaj Mondperceptoj per la Biologio

A. Albault, Francujo, Superpopolado, Konsekvenco de Kronika Malsato

Erkki Kääriäinen, Finnlando, Pri la Postsekvoj de la Glacia Epoko en Fenoskandio

Klaus Wandelt, Germanujo, Cibernetiko

Hans Straßl, Germanujo, Ranger Fotas la Lunon

Krome la libro entenas bibliografiojn, biografietojn kaj fotojn de la aŭtoroj kaj antaŭparolon de Uwe Joachim Moritz.

Bibliografiaj notoj: Formato 13,5 x 21 cm, 170 paĝoj, broŝurita, kun ilustraĵoj, Eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, 1967. Prezo 9,60 GM + afranko.

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Eldonejo kaj Libroservo,

Postfach 2113, 85 Nürnberg 2, Germanujo — Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56
aŭ ĉe **Universala Esperanto-Asocio**

ESPERANTO-LITERATURO EL GERMANUJO

NIKO KAJ NINA de J. F. Berger
Postkursa legolibreto originala
72 p. broŝ. 2,40 GM

LA NEKONATINO de R. C. Muschler
traduk. de Ludwig Goppel
Mondfama novelo 72 p. broŝ. 2,— GM
bind. 3,— GM

LA ARTO FARIĜI CENTJARA
de L. Wegener
Konsiloj de kuracisto
62 p., broŝ. 2,— GM

LETERO EL LA TRANSCENDO
de P. Krempel
traduk. de M. M. Mielert
Letero de juna animo el la infero
36 p., broŝ. 1,20 GM

EL LA VIVO DE NETAŬGULO
de J. v. Eichendorff
traduk. de Paul Bennemann
Trezo de la germana Esperanto-
literaturo
140 p., bind., kun ilustraĵoj 4,80 GM

**TRIFOJE AKURATE JE LA
DEKDUA HORO** de Walter Galdert
traduk. de Fr. Ellersieck
Interesa kriminalromano
160 p., kartonita 4,90 GM

**SAGEOJ KAJ RAKONTOJ
LAŬLONGE LA REJNO**
de Johanna Pagenstecher
48 p., kartonita 2,85 GM

**KIEL AŬTODIDAKTO AL
PEDAGOGIA SCIENCO**
de Klemenz Wiczorek
40 p., broŝ. 1,80 GM

JUNULARO KANTAS
143 kantoj en Esperanto
144 p. broŝ. 3,— GM
bind. 3,80 GM

Speciala oferto

Ĉiuj 9 libroj kune — laŭeble binditaj ekzempleroj — kostas nur 16,— GM aŭ 4 dolarojn! Sed vi povas mendi ankaŭ unuopajn librojn laŭ la indikita prezo.

Ĉiu mendinto ricevos senkoste la aktualan, **luksan informbroŝuron FAKTOJ PRI GERMANUJO**, 3a eldono.

Mendu ĉe **LUDWIG PICKEL**, Libroservo, Postfach 2113, 85 Nürnberg 2, Germanujo.
Antaŭpagoj per bankĉekoj, monbiletoj aŭ al pĉk. Nürnberg 819 56